**15a ORDINARA DIMANĈO - A 16an de JULIO 2017**

# SEMANTO ELIRIS POR SEMI

**Komento al la evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Mateo 13, 1-23**

**En tiu tago Jesuo eliris el la domo kaj sidiĝis apud la lagobordo, kaj kolektiĝis ĉirkaŭ Li tiel granda popolamaso, ke Li suriris ŝipeton, kaj tie Li sidiĝis, dum la tuta popolo restadis ĉe la bordo. Kaj Li multe parolis al ili per paraboloj, dirante:**

**„Iu kampulo iris por semi. Dum la semado, iuj semoj falis apud la vojo; kaj la birdoj venis kaj formanĝis ilin. Aliaj falis sur ŝtonplenan lokon, kie ili ne havis multe da tero. Tuj ili ekkreskis, ĉar ili ne povis enprofundiĝi. Sed kiam la suno leviĝis, ĉar ili ne havis profundajn radikojn, ili forvelkis kaj brulsekiĝis. Aliaj falis inter dornarbustoj. Ĉi tiuj kreskis kaj sufokis la ĝermintajn semojn. Sed aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis abundan frukton centoblan, sesdekoblan, tridekoblan. Kiu havas orelojn, tiu aŭdu."**

**Tiam la disĉiploj alproksimiĝis al Jesuo, dirante: „Kial Vi parolas al ili per paraboloj?" Li respondis: „Ĉar al vi, simpluloj, Dio rivelas la misterojn de la regno de la ĉielo, sed al ili ne. Tiel al tiu, kiu havas ion, estos aldonate eĉ pli; sed al tiu, kiu ne havas, estos forprenata eĉ tio, kion li havas. Pro tio Mi parolas al ili per paraboloj, tiel ke ili rigardas, sed ne vidas; ili aŭskultas, sed ne komprenas. Por ili plenumiĝas tiu profetaĵo, kiu estas en la libro de Jesaja:**

*‚Vi aŭdos, sed vi ne komprenos;*
*vi rigardos, sed vi ne vidos.*
*Ĉar la koro de ĉi tiu popolo obstiniĝis,*
*iliaj oreloj eksurdiĝis.*
*Ili fermas siajn okulojn*
*por ne vidi;*
*ili ne aŭdas per siaj oreloj,*
*nek komprenas per sia koro;*
*pro tio ili ne konvertiĝas*
*kaj Mi ne povas resanigi ilin.'*

**Sed vi estas beataj, ĉar viaj okuloj vidas, kaj viaj oreloj aŭdas.**
**Vere Mi diras al vi, ke multaj profetoj kaj justuloj deziris vidi tion, kion vi vidas, sed ili ne vidis, kaj aŭdi tion, kion vi aŭdas, sed ili ne aŭdis."**

**Poste Jesuo diris: „Aŭskultu do la signifon de la parabolo pri la semanto. Tiuj, kiuj aŭdas la vorton de la Regno kaj ne komprenas ĝin estas kiel la strato: venas la malbonulo kaj forprenas tion, kio estis semita en lia koro. Aliaj estas kiel ŝtonplena tero. Ili aŭskultas, ja, la vorton, kaj tuj ili akceptas ĝoje ĝin; sed ili estas malkonstantaj, ili ne donas al la vorto eblecon enradikiĝi. Kiam venas suferoj aŭ persekutoj pro la dia vorto, tuj ili senkuraĝiĝas. Aliaj estas kiel tero rubusplena: ili aŭdas la vorton de Dio, sed la zorgoj de la mondo, la volupto kaj trompo de riĉeco sufokas la vorton de Dio, kaj ĝi fariĝas senfrukta. Fine, kelkaj estas kiel la bona grundo; ili komprenas kaj fruktigas ĝin; kaj la dia vorto produktas centoble, sesdekoble, aŭ tridekoble."**

La parabolo de la semanto, rakontita de Jesuo en la evangelio de Mateo ĉe la komenco de la 13-a ĉapitro, estas kuraĝigo por ĉiuj, kiuj anoncas la vorton. La rezulto ne dependas de la semo, de la vorto, sed ĝi dependas de la grundo. Por kompreni ĉi tiun parabolon, oni devas referenci la anoncon de la Sinjoro en profeto Jesaja: "tiel estos Mia vorto, kiu eliras el Mia buŝo; ĝi ne revenos al Mi vane, sed plenumos Mian volon, kaj sukcesos en tio, por kio Mi ĝin sendis". La Sinjoro certigas, ke lia vorto entenas en si mem krean energion, tiu sama vorto de la Kreinto kiu diris: "Estu lumo; kaj fariĝis lumo", do ĉi tiu lia vorto entenas krean energion, kiu, kiam ĝi trafas la taŭgan grundon, evoluigas ĉiujn siajn potencialojn.

Jesuo priskribas, en ĉi tiu parabolo, la eblecojn, kaj ankaŭ la malfacilaĵojn en la akcepto de ĉi tiu vorto. Jesuo mem klarigas ĝin, ja en la dua parto Jesuo asertas: *"Aŭskultu do la signifon de la parabolo pri la semanto"*, kiu evidente estas Jesuo kaj ĉiuj kiuj semas ĉi tiun vorton, *"Tiuj, kiuj aŭdas la vorton de la Regno"*, la vorto estas de la Regno, la alternativa socio proponata de Jesuo, *"kaj ne komprenas ĝin"*, kial do ili ne komprenas ĝin? Ili ne komprenas ĝin ĉar, por akcepti la Regnon, Jesuo metas kiel kondiĉon la konvertiĝon. Kion signifas konvertiĝo? Se ĝis nun vi vivis por vi mem kaj por viaj bezonoj, por viaj necesoj, ekde hodiaŭ ŝanĝu tute vian vivon, vivu por la bono kaj la necesoj de la aliaj, jen la alternativa socio, la regno proponata de Jesuo.

*"ili ne komprenas ĝin, venas la malbonulo"*, Jesuo estis jam parolinta pri ĉi tiu malbonulo kiam, en la 5-a ĉapitro, li diris: "via parolo estu: Jes, jes, ne, ne; ĉio ekster tio estas el la malbonulo", kio estas la malbonulo? Dum Dio estas amo kiu metas sin je la servo de la homoj, la malbonulo estas la povo kiu superregas ilin. Tiam Jesuo avertas ke ĉiuj, kiuj vivas sub la sfero de la povo, estas tute neakceptemaj pri lia vorto, fakte li diras: *"kaj forprenas tion, kio estis semita en ilia koro. Tiuj estas kiel la strato"*, do estas senutile semi, ĉar

tuj alvenas la birdoj. Kion signifas tio? Tiuj kiuj havas la povon nature vidas, en ĉi tiu mesaĝo de Jesuo, minacon al propra superregado super la personoj, sed ankaŭ tiuj kiuj deziregas akiri la povon, ĉar ili vidas en la mesaĝo de Jesuo riskon por iliaj ambicioj, tamen la plej tragedia kategorio konsistas el tiuj kiuj estas submetitaj al la povo, ĉar ili vidas en la mesaĝo de Jesuo atencon al la sekureco donata de la submetiĝo al la povo, ĉi tiuj estas tute neakceptemaj.

*"Aliaj estas kiel ŝtonplena tero. Ili aŭskultas, ja, la vorton, kaj tuj ili akceptas ĝoje ĝin;"*, do ili vidas en ĉi tiu vorto la respondon al ilia deziro je pleneco de vivo, *"sed ili ne donas al la vorto eblecon enradikiĝi"*, kion ĝi signifas? ke ĉi tiu vorto ne transformas la unuopulon, *"kaj ili estas malkonstantaj. Kiam venas suferoj aŭ persekutoj, tuj ili senkuraĝiĝas."*, Jesuo en la parabolo diris *"kiam la suno leviĝis"*, la suno estas fonto, estas faktoro de vivo por la kreskaĵo; se la suno ĝin bruligas ne kulpas la suno, tio okazas ĉar la kreskaĵo ne povis enradikiĝi. Ĉi tie laŭ Jesuo la efiko de la suno estas la suferado aŭ la persekuto: la persekuto, por la unuopulo kaj por la komunumo, ne estas fakoro de pereo, sed de kresko: se ĝi pereigas, tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la unuopulo, la komunumo, ne modifis sian ekziston. Kaj do ankaŭ en ĉi tiu okazo estas malsukceso.

*"Aliaj estas kiel tero rubusplena: ili aŭdas la vorton de Dio, sed la zorgoj de la mondo, la volupto kaj trompo de riĉeco sufokas la vorton de Dio, kaj ĝi fariĝas senfrukta."*, Jesuo metis kiel kondiĉon la konvertiĝon, nome, vivu por la aliaj kaj ne por vi mem; se vi vivas por vi, kaj troviĝas en nebona ekonomia situacio,  vi vidas la solvon en la mono, sed tuj kiam vi sukcesas atingi, akiri ĉi tiun monon, senprokraste naskiĝas novaj ambicioj, novaj postuloj, kaj denove vi troviĝas en ekonomiaj zorgoj. Tiam, kiu zorgas nur pri siaj bezonoj, kiu estas ĉiam zorgoplena pri sia ekonomia situacio, kiel do li povos okupiĝi pri la bezonoj, la necesoj de la aliaj?

Fine, *"kelkaj estas kiel la bona grundo; ili komprenas"*, ili komprenas ĝuste ĉar ili konvertiĝis, *"kaj fruktigas ĝin;"*, por kompreni la esprimon de Jesuo, paradoksan sed netute tian, oni devas scii ke, en la tiuepoka kulturo, el tritika semo oni eltiris spikon kun sep, ok grajnoj. Kiam la jaro estis favora, la spiko enhavis dek grajnojn, en esceptaj situacioj oni trovis eĉ spikon kun tridek grajnoj, sed temis pri eksterordinara situacio. Nu, Jesuo metas je la lasta loko tion, kio por la homoj estas eksterordinara, fakte li diras: *"la dia vorto produktas centoble, sesdekoble, aŭ tridekoble."*, kion volas diri Jesuo? Kiam la grundo estas taŭga, la krea vorto eligas sian tutan kapablon, sian tutan potencialon, en maniero, kiun la homo eĉ ne povas imagi.